

Esperanto-Numismatika Asocio



Esperanta Numismatiko

2022

Jarkolekto 9 – Numero 2



ENHAVOTABELO

de aprilo 2022

Titolpaĝo:	1
Enhavotabelo	2
De ni por ... ni!	3
Moneroj & medaloj	4
<i>Medalo honore al José Américo de Almeida (1887-1980)</i>	
<i>Fazenda Escola Bona Espero Brazilo</i>	
<i>Internacia Ekspozicio de Floroj</i>	
<i>Profesoro Pēteris Kikauka (1886-1967)</i>	
Esperantaj stampolamenoj: Internacia Simpozio “Esperanto kaj Turismo”	11
Spikumajoj & suplementoj: Rarega provfandaĵo 1969	12
Valormarkoj & valorbiletoj: Hispana loteribiletto 2008	13
Aspektoj de numismatiko: Monaj kaj monecaj ornamaĵoj (2)	15
Por spuremuloj: Ĉu jen la plej olda esperanta “ĵetono”?	18
Medalistoj: 29 Stanisława Wątróbska-Frindt (1934-1994)	19
Historiaj aspektoj: Kiel la prusoj kreis oron el fero	21
Terminaro: alfabet listo (29)	22
Numismatika Forumo: Tial radikalaj dekstruloj tiel arde adoras bitmonon	23
El la gazetaro:	24
Retpoŝto	25
Anoncoj & eventoj	43

Honora membro: Hans Jankowski (1928-2018)

Tajpado kaj paĝaranĝo: Vivienne Tudts
Provlegado: Jozefo Horvath
Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!
Finredaktoro: Bert Boon

Kontakto: bert.boon@skynet.be
Retejo: <http://ena.frali.bplaced.net>
www.esperanto.es/biblioteko
www.kolektado.esperanto.cc

DE NI POR ... NI!

*“Inter revo kaj realigo
staras multaj leĝoj kaj
realaj problemoj...”*

Vilhelmo Elŝot (1882-1960)



Ĉi-foje “*De ni ...*” estas dediĉata al ĉiuj viktimoj de la milito inter Rusio kaj Ukrainio – soldatoj kaj civitanoj –, kiuj mem respektis la internaciajn homajn rajtojn koncerne militojn. Fakte, provizore numismatiko (kaj multaj aliaj temoj) apenaŭ gravas.


Jam diversfoje post la dua mondmilito la mondo troviĝis ege proksime de la abismo. Nun la timo pro la eksplodo de tria mondmilito kaj mondvasta katastrofo malhelpas radikale kaj efike protekti la homojn en Ukrainio, kies vivo unuflanke kaj kies havaĵoj kaj posedaĵoj aliflanke estas daŭre endanĝerigataj.

ENA mem kontaktis kvar membrojn, por informiĝi pri la surloka situacio kaj pri ilia sorto. Bedaŭrinde nur unu el ili reagis aŭ kapablis reagi. Solidareco tamen ne sufiĉos, por nuligi la konflikton, por fini la kruelajn batalojn, malgraŭ la kuraĝo kaj la persisto de la loĝantaro.

Kiam en 1917 mortis la iniciatinto de Esperanto, ankoraŭ terure furiozis la tiel nomata Granda Milito (1914-1918). Feliĉe por li, nia ege elrevigita Ludoviko ne devis suferi pro la katastrofo de la dua mondmilito kaj la tiama kruela sorto de diversaj familianoj en naziaj koncentrejoj. Sendube li kaj centoj da esperantistoj, ĉeestintoj de la deka Universala Kongreso fuĝantaj el Parizo, jam tiam ekdubis pri la homa “civilizo” kaj la pli grava celo de la Esperanto-movado.

Domaĝe denove estas malfermita la skatolo de Pandora. Kiel sciite, en tiu skatolo restis nur la Espero. Pro tio ni, esperantistoj kaj ĉiuj niaj proksimuloj, ne rajtas rezigni. La Espero ĉiam renaskas la fidon, kiu baldaŭ espereble denove montros la vojon al raciigo kaj harmonio pere de interhoma parolado – eĉ interdiskutado – en iu “komuna lingvo”, kiel ponto por inspiri malamikojn unuvoĉe kaj pozitive decidi pri kio vere gravas: PACO!

Bert



“La verko estas konsiderata kiel la unua "modernisma" romano en Brazilo. En ĝi estas rakonto pri nomada familio, kiu alvenas el seka regiono de Paraibo al sukerkana bieno en agrikultura regiono. Tie okazas amrilatoj inter nomadino Soledade kaj la filo de bienisto, sed ŝi fariĝas amatino de lia patro. Nomado de ŝia grupo, kiu amas Soledade-n, mortigas la bieniston kaj la filo de alia bienisto defendas lin kiel advokato. Soledade reiras al la seka regiono kaj revenas en la fino de la libro dum nova vojaĝo.

En la verko estas multaj dialogoj en dialekto kaj la verkisto uzis multajn dialektajn vortojn, kiuj malfaciligis la tradukon al Esperanto. Geraldo Mattos ne bone konis la paraiban dialekton, kaj pro tio oni kritikis lian tradukon. Jason Gonçalves de Lima preparis erudician studon pri la problemoj de la traduko.”

La verkisto estis subŝtatestro de Paraibo kaj ministro. Li estis simpatianto de Esperanto kaj lasis en testamento deziron kaj permeson por la traduko de la romano kaj eĉ malgrandan monsumon por helpi eldoni la esperantan version.

La libro estis eldonita unuafoje en 1928. La esperanta versio estis eldonita en 1985 kaj estas 176-paĝa...

MONEROJ & MEDALOJ

Tipo B1 - Neesperantaj moneroj kaj medaloj rilate al Esperanto

Medalo honore al José Américo de Almeida (1887-1980)



Lando: Brazilo

Metalo: bronzo

Diametro: 40 mm

Jaro: 1987



Kvanto: *serĉata*

Pezo: 29 g

Medalisto: *serĉata*

Diko: *serĉata*

Averso:

fone: sensignifaj markoj (“arabeskoj”) imitantaj manskribaĵojn

meze: busto de José Américo de Almeida, parte maldekstren. Sur la kolumo kvinpinta steleto

sube: lia nomo manskribstile

Reverso:

krado 5x5, enhavanta naŭ figurojn kaj du jarindikojn

supre: “1887”, rilate al la naskiĝjaro de la omaĝito

meze: figuroj, imitantaj brazilan popolartan stilon

- la tri superaj: suno, akaĵuo kaj kakto

- la tri mezaj: viro kun tradicia ĉapo, emigrantoj kaj riĉula domo

- sur la baza nivelo: sukerkano, bovo kaj palmarbo

sube: jarindiko “1987”

Rimarko 1:

Hazarde la naskiĝjaro de Almeida koincidas kun la eldono de la Unua Libro de Zamenhof, la jubilea jaro de lia naskiĝo, tiel ankaŭ kun la jubilea datreveno de la eldono de tiu Unua Libro.

Rimarko2:

Almeida estis esperantisto, sed ne movadano. Esperanton li lernis kiel junulo kaj li poste mone apogis kaj protektis la lokan movadon. En testamento li donacis al la loka grupo malgrandan sumon, por ebligi tradukon kaj publikigon de sia ĉefa romano, la majstroverko “A Bagaceira” (1928), krome premion rilate al postaj eseoj pri sia verko. Ĝi estis fakte tradukita kaj eldonita en 1985 de Geraldo Mattos sub la titolo “La Bagasejo” kaj eldonita de “Fonto”.

Rimarko3:

José estis brazila politikisto, advokato kaj verkisto. Li naskiĝis kiel filo de riĉa, influa familio. Li do facile eniris la politikon jam dum sia juneco kaj iĝis deputito, guberniestro, ministro kaj ambasadoro.



Iu devas paroli
laŭte paroli
kaj
eldiri ĉion,
kostu kiom tio kostas.

La redakcio tutkore dankas nian tute novan, 151an, ENA-membron el Brazilo, Roberto da Silva Ribeiro, kiu entuziasme sendis tre taŭgajn kaj kompletajn informojn pri la priskribita medalo.

Tipo D2 - Plaketoj kaj medalonoj

Fazenda Escola Bona Espero Brazilo



Lando: Brazilo

Kvanto: 100

Metalo: bronzo

Pezo: *serçata*

Diametroj: 120 mm/150 mm

Artisto: Otto Sandkühler

Jaro: 80aj jaroj

Fabrikisto: Andrzej Grzembowski

Averso:

ĉirkaŭe: “* FAZENDA ESCOLA * BONA ESPERO”

meze: simbolo kun tri folioj kaj malfermita libro

Rimarko 1:

La tri folioj signifas, ke la lernejo (simbole: lernolibro) troviĝas en grandega bieno (= “fazenda” en la portugala) de 1440 hektaroj, kie la organizo “Bona Espero” en Alta Paraíso de Goiás protektas la originan savanon kaj plantas ĉiujn manĝaĵojn kiujn pli ol mil infanoj kaj instruistoj manĝis dum la jaroj. La bieno troviĝas en la Nacia Parko “Chapoda dos Veadeiros”.



Rimarko.2:

La 26an de julio 2022 Bona Espero, senprofitcela institucio festos 65 jarojn favore al ok urbetoj kaj vilaĝoj en malriĉaj agraraj regionoj. La infanoj estis plejparte el analfabetaj familioj, do la lernejo signifis grandan socian kaj kulturen avancon. Ĉefe temis pri infanoj el *kilombo*, grupo de kaŝitaj afrikdevenaj ekssklavoj, kiuj vivis inter montoj dum pli ol 200 jaroj, tute izolitaj ĝis la okdekaj jaroj de la 20a jarcento.

Rimarko.3:

Otto Sandkühler, la karmemora frato de s-ino Ursula Grattapaglia, la iniciatorino kaj direktorino de la projekto, estis grafika desegnisto kaj iasence artisto pri informmodeloj. Li, estante voluntulo en Bona Espero, kreis kaj skizis la simbolon.

Rimarko 4:

La produktisto de la murmedalo estis la pola esperantisto Andrzej Grzembowski. Li estris turisman agentejon kaj volis sendi grupon de esperantistoj al vizito de Brazilo kaj de la bieno. Por solvi la finanĉan problemon Bona Espero, ricevinte 100 murmedalojn, povis gastigi belan grupon de polaj esperantistoj dum la okdekaj jaroj.

Rimarko 5:



TV-kanalo “SUPREN”, estrita de esperantistoj en la ĉefurbo Braziljo, faros baldaŭ specialan programon pri ENA kaj ĝia revuo. Tiu kanalo elsendas konstantan kurson de la lingvo kaj informprogramojn pri la utiligo de Esperanto. Membroj de Bona Espero aktive kunlaboras en ĝi.

Rimarko 6:

Sinjorino Grattapaglia kaj ŝia edzo Giuseppe ricevis pro sia humana kaj sukcesplena projekto la 14an de decembro 2013 la premion “Medalo de Toleremo”, kreita de Fondumo Zamenhof en Bjalistoko, la naskiĝurbo de Zamenhof.



La redakcio de “Esperanta Numismatiko” tutkore dankas s-inon Grattapaglia pro la sendo de bonkvalita foto de la murmedalo kaj de multaj informoj poste prilaboritaj en ĉi priskribo kaj ni antaŭdankas pro la intenco elsendi specialan programon per TV- SUPREN pri nia ENA-revuo.

Tipo D1 - Esperantaj unuflankaj medaloj

Internacia Ekspozicio de Floroj



Lando: Brazilo

Kvanto: *serĉata*

Metalo: kupronikelo

Pezo: 20 g

Diametro: 50 mm

Medalisto: *serĉata*

Jaro: 1980 (?)

Diko: *serĉata*

Averso: (unuflanka medalo kun truita hoketo)

supre: FLOR – LUDOJ ★ JOGOS FLORAIS
KULTURA KOOP. DE ESPERANTISTOJ

meze: I BIEFLOR

sube: verda steleto kun ena litero E(speranto)
ruĝa rozo kun verdaj folioj kaj blanka fono

Rimarko 1:

I = 1a

BIEFLOR = **B**razila **I**nternacia **E**kspozicio de **FLOR**oj

La ekspozicio okazis komence de la 1980aj jaroj en Rio de Janeiro

Rimarko 2:

JOGOS FLORAIS = FLOR-LUDOJ en la portugala

KOOP. = kooperativo

Rimarko 3:

“Kultura Kooperativo de esperantistoj” estas brazila asocio

Tipo D 1 – Unuflankaj esperantaj medaloj

Profesoro Pēteris Kikauka (1886-1967)



Lando: Latvio

Kvanto: *serĉata*

Metalo: bronzo

Pezo: *serĉata*

Diametro: 84 mm

Medalisto: Jānis Strupulis

Jaro: 1986

Diko: *serĉata*

Averso (*unuflanka medalo*):

Anbaŭflanke: samaspektaj laŭraj branĉetoj; la nomo de la profesoro en latva kaj greka skriboj: “prof. Pēteris Kikauka” “προφ.Πετρος Κικαυκα”

Meze en rektangulo: busto de la profesoro, iome dekstren

Sube: 1886-1967

Rimarko 1:



Profesoro pri la klasika greka lingvo. Li esperantistiĝis en 1907 kaj verkis Esperanto-lernolibron. Krome li tradukis novelojn kaj la zamenhofan poemon “La Espero” en la latvan lingvon.

Rimarko 2:

De dekstre de la jarindikoj: la kutima medalista signo de Strūpulis kun la eldonjaro.

ESPERANTAJ STAMPOLAMENOJ

Internacia Simpozio “Esperanto kaj Turismo” (1985)



Lando: Bulgario
Mezuroj: 42 mm x 33 mm
Pezo: 11,5 g
Gravuristo: *serĉata*

Diko: 2 mm
Metalo: aluminio
Kvanto: 1

Averso: (unuflanka)

supre: esperanta surskribo: INTERNACIA SIMPOZIO ESPERANTO KAJ TURISMO

meze supre: PISANICA

tutmeze: la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica

sube: 4744 Писаница 11-17.9 '85

sube: МЕЖДУНАРОДЕН СИМПОЗИУМ ЕСПЕРАНТО И ТУРИЗМА (bulgara cirilo)

Rimarko:



“Dommastro de la simpozio estis la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica. Ĉe bonegaj laborkondiĉoj, disponante pri la necesa dokumentaro, la partoprenantoj en la simpozio kunsidis en lukse aranĝita konferenĉalo.”

El artikolo “Internacia simpozio pri turismo”, far inĝ. Petâr Todorov en “Bulgara Esperantisto”, jaro 54, n-ro 2, nov. 1985, p. 2-3

SPIKUMAĴOJ & SUPLEMENTOJ

Rarega provfandaĵo 1969



Jen provfandaĵo por la ĉi-suba averso de bronzkolora medalo (jam priskribita en jarkolekto 4 n-ro 2 p. 9).

La substanco estas tre probable la ĉipa alojo nomata “zamako”, t.e. alojo konsistanta el 90% da zinko kaj 10% da aluminio + kupro. La fandtemperaturo estas nur 120°. Malavantaĝo estas tre ofte aerveziketoj. Do, ĝi ne vere taŭgas por fari artobjektojn, nur por provfandaĵoj.

Tiu substanco tamen estas relative malpeza. Jen la rezulto de pesado de la medaloj sube kaj de la provfanda medalo supre: bronzkolora: 77,74 g

arĝentkolora: 63,40 g

provfandaĵo: 20,31 g



VALORMARKOJ & VALORBILETOJ

Hispana loteribiletto 2008



Lando: Hispanio

Kvanto: *serĉata*

Materialo: papero

Lingvo: la hispana

Mezuroj: 105 mm x 60 mm

Koloroj: polikromia kupono

Dato: 17a de majo 2008

Valoro: 1,50 eŭroj

Averso:

supre: strikodo / seria numero / cifera serio

meze - maldekstre en bunta strio: surskriboj en la hispana: “L.L. Zamenhof, kreinto de Esperanto, iniciatinto de la kreado de unu mondo por ĉiuj” “17 MAJO. 08”.

meze - dekstre en bunta strio: kopio de pentrita zamenhofa busto kaj surskribo: “2008 jaro internacia de la lingvoj” / 1,50 €

meze - dekstre (vertikale): ONCE (siglo de la Organizo de Hispanaj Blinduloj) + silueto de blindulo

sube: du ciferaj serioj

Reverso:

Hispanlingva teksto kun listo de diversaj gajneblaj premioj kaj loteria regularo



Rimarko 1:

Granda parto de la sukceso de la Organizo de Hispanaj Blinduloj (konata per la signo ONCE) ŝuldiĝas al ties loterio sub la nomo “Cupón”. Tiu kupono foje montras specialajn bildojn kun diversaj motivoj.

Tiu de la 17a de majo 2008 montras portreton de doktoro Zamenhof. La iniciaton prenis laborgrupo, kiu en la sino de Hispana Esperanto-Federacio (HEF) organizis diversajn agadojn por la kunmemoro de la Internacia Jaro de Lingvoj 2008, koincide kun la centjariĝo de UEA. Grandan meriton havas nia hispana samideano Pedro Zurita.

Estis antaŭe gazetarkampanjo, por informi al esperantaj komunikiloj.

Rimarko 2:

la portreto de Zamenhof sur la kupono estas fragmento de poŝtkarto eldonita okaze de la kvara Universala Kongreso de Esperanto en Dreseno de 1908! “*Laŭ unuvoĉa juĝo la plej bela kolorigita bildo de nia majstro*” (laŭ reklama slogano de la Esperanta librejo E. Lindenberg en Dreseno sur la dorso de la sama poŝtkarto). Por 20 pecoj oni tiutempe pagis 0,500 sm.



Ni tutkore dankas nian membron Germain Pirlot pro la informoj kaj klarigoj.

ASPEKTOJ DE NUMISMATIKO

Monaj kaj monecaj ornamaĵoj (2)

C. La lulilo de la numismatika scienco

La numismatiko kiel scienco naskiĝis kaj evoluis en Italio dum la epoko de la renesanco, kiam la intereso por la antikvaj (grekaj, romiaj ...) kulturoj reviviĝis. Tamen, scienculoj preferis studi kaj riĉuloj emis prefere kolekti romiajn monerojn. Tute ne vekis entuziasmon la grekaj kaj la mezepokaj ("barbaraj"!) moneroj.

Gravis por la frua numismatiko, ke la romiaj moneroj estis konsiderataj ne nur kiel historiaj pagiloj, sed ankaŭ kiel veraj artefaktoj kun alegoria kaj memorcela kromvaloroj. Sur tiu fundamento dum la 15a jarcento estis kreitaj en Italio - laŭ modeloj de romiaj moneroj - monecaj objektoj laŭ komisiono de luksamaj reĝoj kaj aliaj potenculoj. Kiel la originalaj, klasikaj moneroj, tiuj "novaĵoj" celis famigi kaj memori la riĉajn komisiintojn. La averso oftege montris portretbustojn, kiel la iamaj romiaj, la reverso adekvatan bildon rilate al la vivo kaj la realigoj de la "portretita" persono.

Dum la 5a kaj la 6a jarcentoj romiaj moneroj iĝis tre raraj. Multaj tiamaj ornamaĵoj tial estis nur maldikaj oraj lamenoj, tre ofte nur imitaĵoj de romiaj moneroj.

Malpli riĉaj civitanoj, ofte urbanoj, inspiritaj de altranguloj, imitis ilian konduton kaj pro manko de respektindaj monrimedoj, ili faris aŭ komisiis fari ornamaĵojn surbaze de malpli valoraj moneroj, por plibeligi korpon aŭ vestaĵojn.

D. La granda ĉagreno de ĝisostaj numismatoj

En Interreto abundas anoncoj de t.n. juvelistoj, kiuj pretas fari por vi el via olda aŭ nova ora aŭ arĝenta medalo novan ringon, broĉon, pendaĵon aŭ alispecan "juvelon".



Fervoraj (esperantistaj) numismatoj spertas teruran koŝmaron, rigardante la aspekton de la ĉi-supraj arĝentaj moneroj de 25 steloj aŭ, ankoraŭ pli abomene, de la ege rara kaj ikona monero de unu spesmilo el 1912, transformigitaj kiel broĉo, kolĉeno, ringo, orependaĵo k.a.!




Moneroj kaj medaloj, de kiuj poste la originalaĵoj estas rekuperitaj, montras spurojn de la krom- kaj misuzado kiel t.n. ornamaĵoj. Pere de kelkaj ekzemploj ni nun povas montri laŭvice spurojn de klemetoj, lutaĵoj, muntumoj kaj veldaĵoj...



Klemetaj spuroj sur monero el pendaĵo



Spuro de veldaĵo por krei pendigilon



Muntumo kaŭzis senkoloriĝon de la rando



Veldita fermilo de iama broĉo

Rekuperitaj objektoj kun difektoj aŭ breĉetoj perdas sian valoron kiel historiaj artefaktoj kaj kiel komercaj kolektaĵoj. Restas nur la valoro de la eventuala nobla metalo je kelkaj grametoj. Tute ne rekomendinde, eĉ se vi havus tro da mono sur via bankokonto!

E. Mutilitaj moneroj. Ĉu artefaktoj aŭ brikabrakoj?

Ankaŭ la neriĉuloj el ni prave deziras ornami sin per monerornamaĵoj. Por kontentigi tiun segmenton de la merkato, komercaj lertuloj - slojduloj en Interreto kaj en grandaj urboj sur vendoplacoj, montras siajn kapricojn.

Ili mutilas plejofte ne plu validajn monerojn el diversaj landoj per sega “liberigado” kaj forigado de “neutilaj” partoj de la monero.



Foje la rezulto estas – ĉar profesie farita – iom akceptebla, sed tro ofte la novaĵo estas amatora laboraĉo.



Manlaboristo en la urba centro de Lisbono dum la Universala Kongreso de 2018




Daŭrigota

POR SPUREMULOJ!

Ĉu jen la plej olda esperanta “ĵetono”?

En la arkivoj de ENA troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj ni scias ĝis hodiaŭ preskaŭ nenion. **NI DENOVE BEZONAS VIAN HELPON!**

26a enigmo



MEDALISTOJ

29. Stanisława Wątróbska-Frindt (1934 – 1994)



Fraŭline nomita Reczek, Stanisława naskiĝis la 3an de aprilo 1934 en Jaworzno (Pollando).

En 1957 ŝi finstudis en la Ŝtata Mezlernejo pri Plastikaj Tehnologioj en Zakopano. Dum la jaroj 1957-1965 ŝi studis en la Akademio de l' Belaj Artoj en la ĉefurbo Varsovio en la fakultato pri "skulptismo". Ekde 1965 dum preskaŭ 30 jaroj ŝi laboris kiel ĉefartistino de la Ŝtata Monfarejo.

Kiel fakulino pri kreado de moneroj kaj de medaloj ŝi skizis preskaŭ 100 monerojn kaj ne malpli ol 900 medalojn, poŝtmarkojn kaj insignojn.

Ŝiaj kreaĵoj troviĝas en multaj muzeoj en Pollando kaj eksterlande kaj ŝi tre ofte partoprenis en ekspozicioj, ĉefe en tiuj de la Internacia Federacio pri Medala Arto FIDEM.

Laŭdire Stanisława kutime subskribis monerojn per la monogramoj S kaj W.



Tiu monero estis priskribita en jk. 3 n-ro 4 p. 4



Jen la “rekompensa” medaleta kun diametro de 42,3 mm. Ĝi pezas 22,8 gramojn.

Averso: ĉirkaŭa surskribo: “IN EISERNER ZEIT” (Dum fera epoko). Sube: 1916 super “ornamaĵo” en Novarta stilo. Genuanta virino prenis oran kolĉenon el ujo kaj sekve transdonas ĝin al nevidebla persono aŭ instanco, delegito de la ŝtato.

Reverso: la devizo germanlingve: “GOLD / GAB ICH ZUR / WEHR EISEN / NAHM ICH ZUR / EHR”. Branĉeto de kverkfolioj. Sube: HOSAEUS.

Medalisto: Hermann Kurt Hosaeus (1875 – 1958). Poste membro de la nazi-partio dum la 2a Mondmilito.

Foje germanaj civitanoj “plibeligis” la feran medalon, kiel montras la subaj ekzempleroj, por atentigi pri sia patriotismo aŭ por iome plidolĉigi por si mem la amaran pilonon.



HISTORIAJ ASPEKTOJ

Kiel la prusoj kreis oron el fero

La alkemio (el la araba “al-kimia”), olda branĉo de la naturfilozofio, estis la lulilo de la moderna kemio. Unu el la ĉefaj celoj de la alkemiistoj estis la esplorado por trovi la t.n.ŝtonon de la saĝuloj, la nemalhaveblan ilon por transformi malnoblajn metalojn en oron. Ĉiuj provoj (evidente) malsukcesis, ĝis la unua mondmilito en Germanio (Prusio) dank’al la “Fiŝtono de la demagogio”: la politikaj popoltrompetado kaj la fielpensemado!



Ĝis la jaro 1914 la valoro de moneroj dependis de la titro de oro aŭ arĝento. Ekde la komenco de la mondmilito, mono “malaperis”. Multaj civitanoj volis tuj interŝanĝi siajn bankbiletojn kontraŭ oro aŭ arĝento. Tiu spontana iniciativo instigis la registaron enkonduki trudan kurzon de monbiletoj. En Germanio, kiel en ĉiuj aliaj landoj en milita stato, oro estis nepre nemalhavebla en ĉiuspecaj transakcioj internaciaj. La lando do

devigis la civitanojn disponigi la propran oron al la ŝtato, por subteni la kolektivajn defendon de la patrujo.

Tiu operacio estis inspirita de la iama kampanjo, lanĉita de iu princino Marianne de Prusio dum la liberiga milito de 1813 kontraŭ la armeoj de Napoleono. Tiu interveno kondukis al la unua abdiko de la franca imperiestro.

En 1916 simila projekto iĝis patriotisma devo. La lernantaro de la liceo de Guterslo ekzemple ricevis unutagan forpermeson, por kolekti valoraĵojn. Ili fakte rikoltis ie kaj tie en la urbo juvelojn kaj orajn monerojn kaj medalojn, valorantajn 25.000 markojn! Kvankam la partopreno estis oficiale nedeviga, la socia premado estis kvazaŭ neevitebla. Se iu decidis anstataŭigi la oran horloĝujon de sia poŝhorloĝo per ujo el fero, ĉiufoje kiam li kontrolis la tempon, la posedanto estis vaste agnoskata kiel “laŭdinda patrioto”. Por virinoj ne eblis publike surhavi orajn juvelojn; la sociala kontrolo estis ege severa. Eĉ urbaj kaj ekleziaj asocioj ne povis submetiĝi al la kolektema febro.

Granda parto de la kultura heredaĵo de Germanio tiel por ĉiam malaperis en tiun teruran fandujon por noblaj metaloj. Rekompenca la “donacema” patrioto ricevis feran medaleton kun devizo: **“Oron mi donacis por defendo, feron mi ricevis por honoro”**. Tiu medaletaĉo estis liverita en papera koverteto, foje kun atestilo, foje kun eta reklama mesaĝo.

Tia vera historio bezonas laŭ ni moralinstruon:

***“Multe pli danĝeraj ol alkemiistoj:
politikistoj kaj militistoj!”***

TERMINARO

Alfabeto listo (29)

bankista signo: *eta marko de bankisto aŭ komercisto, por indiki, ke iu monero ne estas falsaĵo kaj por konfirmi, ke ĝi havas la oficialan, laŭleĝan pezon. Trovebla sur oldaj aŭ mezepokaj moneroj, sed ankaŭ sur arĝentaj moneroj, kiuj cirkulis en Ĉinio kaj Japanio, kie ĝi estis nomita "haksigno".*

blanko: *1. metala lameno, preparita por stampi sur ĝin la bildon de monero. 2. La ne-stampita flanko de unuflanka monero aŭ medalo.*

bronz: *sur kupro bazita alojo, kies dua elemento esta stano.*

bulionmonero: *nobla metalo monerforma, kies valoro en la merkato estas indikata de la metaltitro kaj ne de la malofteco aŭ la numismatika valoro. Ekzemple la "Krugerrand" el Sud-Afriko.*

buliono: *noba metalo (platino, oro, arĝento) en formo de stango, briko aŭ plato.*

dumetala monero: *monero farita per unu metalo en la centro kaj alia en ekstera ringo. Ekzemple: la 1- kaj 2-eŭraj moneroj.*

eksonumio: *pristudo de monecaj objektoj, kiel simbolaj moneroj kaj medaloj kaj aliaj pagiloj, uzataj por anstataŭi oficialajn, laŭleĝajn valutojn. Ankaŭ termino por priskribi monerojn, eldonatajn por rememorigi eventojn.*

gobogo: *enlanda malajzia termino por templomoneroj dum la hindua epoko en Javo.*

hastelojo: *alajo el nikelo, kobalto, kromio, molibdeno, volkramo kaj fero. Tre efika kontraŭ korodo kaj diversaj kaŭstikaj kaj acidaj substancoj.*

invaro: *alajo el nikelo (36%) kaj fero (64%). Post varmigo tiu alojo apenaŭ dilatatas. Do tre taŭga i.a. por la farado de reloj.*

kalkulĵetono: *ĵetono uzita ĝis la fino de la 17a jarcento, por kalkuli valorojn per kalkultabulo aŭ -mato. La valoro dependis de la kvadrato, en kiun la ĵetono estis metita.*

magistrata ĵetono: *ĵetono por ĉeestintoj, donita al membroj de urbaj magistratoj, interŝanĝebla kontraŭ kontanta mono.*

moneca: *priskriba termino por objektoj kun aspekto kaj ecoj de moneroj.*

notafilio: *pristudo de paperaj pagiloj kaj de monbiletoj.*

zamako: *alajo el la grupo de neferaĵoj pro manko de fero: 90% estas zinko + iom da aluminio kaj da kupro. La termino estas komerca produktano, kompilita de la komencaj literoj de zinko, aluminio, magnezio kaj kupro.*

Tial radikalaj dekstruloj tiel arde adoras bitmonon

Laŭ Paul Krugman en “The New York Times” bitmono unuflanke celas krei monan sistemon, kiu funkcias sen bazo de fido, aliflanke la strategio de radikalaj dekstruloj estas bazita sur favorado de malfido. Tial ni devas kompreni kial la kriptomovado aspektas kiel sekto.

La ĝenerala “klientaro” de la bankoj pagas pere de bankokartoj, kiel Apple Pay, Pay Pal ktp, ĉar tiuj financaj perantoj estas ligitaj al bankokontoj. Bitmono volas eksterludigi tiun prifidan faktoron kaj krei pagilon kiu, dank’al kriptografio, iĝas sendependa de la financaj institutoj.

Bitmono tamen nur tre malofte estas uzata kiel vera pagilo, t.e. por la aĉeto de varoj kaj servoj. Konkretaj datenoj estas ege raraj, ĉar la plimulto de la transakcioj estas nur spekulado. Tamen bitmono kaj ties konkurentoj aktuale havas merkatan valoron de pli ol unu duiliono (1.000.000.000.000) da usonaj dolaroj!

Kion la bitmonaj investantoj do esperas tiel “aĉeti”?

Unuavice protekton kontraŭ la eterna timo, ke inflacio povus forvaporigi riĉecon. Tiu pripensado ne estas tute fikcia, ĉar mondvaste jam okazis 57 krizoj pro hiperinflacio. Tiuj tamen okazis nur en periodoj de politika kaj social ĥaoso. Tio tamen tute ne estas la perfekta situacio, por kontantigi la bitmonan ŝparujon, male!

La dua kialo estas la timo “veni tro malfrue”. Bitmono havas allogajn merkatesplorajn atutajn kartojn: “kripto” sonas kiel superbe teknika kaj futurisma. Altrangaj politikistoj promocias la alternativajn monunuojn, por esti konsiderataj kiel modernuloj, sed bitmono kaj aliaj kriptomonoj ankaŭ instigas politikan paranojon.

Ĉu bitmono iam implodos?

Ne necese. Ankaŭ oro jam delonge ne plu estas pagilo, sed ĝi ne perdis sian intrinsekan valoron kiel “kandelo por la nokto”.

Krome, ni ne subtaksu la potencon de la gangster submondo. Cirkuladas ĉirkaŭ 1,6 duilionoj da dolaroj en 100-dolaraj biletoj, do 80 % de la usonaj monrimedoj! “Simplaj mortuloj”ne elspezas tiajn biletojn...

Jen do la temo de ĉi artikolo: kiel klarigi la aliancon inter radikalaj dekstruloj kaj bitmono?

Kiel jam dirite: per bitmono la iniciatoro(j) celas krei monunuon nekontroleblan, do ne plu surbaze de fido ĉe la investularo. Kaj, ankaŭ jam dirite: la centra ideo de la dekstra strategio estas krei ĥaoson kaj nuligi fidon je la estraro, kiel pruvas la sekvantaj kvotoj. “*Kovimo estas trompo; la elektado de la usona prezidento estis trompa; ne estas rilato inter la arbarincendioj en Kalifornio kaj la klimatsanĝo, ĉar ili estas kaŭzataj pere de kontrolitaj spaclaseroj*”!

Bitmono do ne nur ludas ekonomian firolon, sed vere estas granda danĝero por la demokratio.

Verkis: Paul Krugman

Prilaboris: Bert

Divastigante Esperanton rapide kaj malmultekoste

Fanzerant

Divulgando um esperanto rápido e de baixo custo

Pouso Alegre - MG - Brazilo / Brasil - Setembro / setembro - 2010 Jaro 1 / Ano 1 - Numero 02 / Número 02

Esperanto kaj la revo pri monda monero O esperanto e o sonho de uma moeda mundial



Paĝoj 05 kaj 06 - Páginas 05 e 06



**Asocio Zamenhof malfemis
novan bazan kurson
Associação Zamenhof abriu
novo curso básico**



Paĝo 02 - Página 02

**Kiuj estas la esperantistoj?
Quem são os esperantistas?**

Jen la opinio de la aktivulo Guilherme Roberti de la urbo Lages Sarikta Katarino - Brazilo.
Eis a opinião do ativista esperantista Guilherme Roberti da cidade de Lages SC - Brasil.

Paĝo 07 - Página 07

**Ĵomart kaj Nataŝa
Jomart e Natasha**

Fama esperanta muzika duopo rakontas al Fanzeranto sian historion en la Esperanta movado.

Famosa dupla musical esperantista conta ao Fanzeranto sua história no movimento esperantista.



Karina, Nataŝa kaj Jomart - Foto sendita de Jomart

Paĝo 04 - Página 04

**Se mi estus birdeto
Se eu fosse um passarinho**

La belega poezio de la poetino Doroti Guiro Marino troviĝas en ĉi tiu numero de Fanzeranto.

A belíssima poesia da poetisa Doroti Guiro Marino se faz presente nesse número do Fanzeranto.

Paĝo 03 - Página 03

REPOŝTO

de vi por ni!

Reagoj kaj konversacioj

04.01.2022 9:51

Kara amiko Jozefo,

jen mi, unuafoje en la nova jaro. Freŝkuraĝe mi kompilis la unuan numeron de la nova jarkolekto. Necesas nun via kutima, nemalhavebla provlego, ne tro peza tasko por vi en la aktuala situacio, mi esperas.

Permesu, ke mi ripetas miajn bondezirojn por vi kaj via familio kaj, ke mi samtempe jam kore dankas vin same sincere kiel kutime.

Amike kaj numismate,

Bert

07.01.2022 10:43

Kara Bert,

dankon por viaj ripetitaj bondeziroj, kiujn mi volonte reciprokas. Mi sendis al vi la ligilon, de kie vi povas elŝuti la plej freŝan numeron de nia revuo kun miaj sugestoj.

Kiel interesajon mi sendas al vi la foton de bela hungara ormonero de cent kronoj, kiun mi antaŭ nelonge ricevis donace de amiko. Bedaŭrinde ĝi ne estas originala, nur poststampo el orita bronzo. Tamen la peco estas tre bela. Ĝi montras la hungaran reĝon Francisko Jozefo (samtempe imperiestro de Aŭstrio) kun la hungaraj krono, sceptro kaj regnoglobo kaj la hungaran grandan blazonon.

Kun amikaj salutoj,

Jozefo



10.12.2021 9:52

Kara amiko Bernhard!

Kiel vi fartas? Mi esperas, ke la viruso ne vizitis vin kaj vian familion! Ni mem ĝis nun restis sanaj.

Vi certe povas imagi, ke mi havas helpopeton favore al ENA... sed ne urĝas!

En via muzea kolekto estas medalo pri Johann Martin Schleyer. La foton (averse kaj reverse) mi havas, mankas al mi kelkaj gravaj informoj por priskribo: diametro, diko, pezo, metalo aŭ alojo, nomo de la medalisto, eldonkvanto. Ne gravas, se vi ne posedus ĉiujn informojn.

Mi celas aldoni ĝin al la rubriko "Ne-esperantaj medaloj rilate al Esperanto" kun kvoto de Zamenhof pri Schleyer en la prelego de Boulogne sur Mer.

Mi antaŭdankas vin tutkore.

Amike kaj numismate,

Bert

17.12.2021 15:02

Kara Bert,
ĉi-kune la informojn, kiujn ni havas:
Diametro: 50 milimetrojn
Diko: 4 milimetrojn
Pezo: 0,05 kilogramojn (venontlunde mi kunportos de mia hejmo pli precizan mezurilon kaj sendos pli ekzaktan nombron)
Metalo
Nomo de la medalisto: ?
Eldonkvanto: ?
Amikajnsalutojn kaj agrablan semajnfinojn,
Bernhard

17.12.2021 18:47

Kara amiko!
Koran dankon. Nun mi povas ekprepari la artikolon!
Amike,
Bert



17.12.2021 15:42

Estimata samidean(in)o,
Antaŭ nelonge en Edukado.net mi legis, ke la fama Cseh-instruistino Madeleine Haudebine el Francio ricevis antaŭ multaj jaroj la Ordenon de la Norvega Esperantista Ligo. Por artikolo, kiel finredaktoro mi serĉas nun informojn pri tiu evento, kaj se eble foton aŭ alian bildon de la eventuala medalo mem.
Mi kore antaŭdankas vin.
Altestime,
Mag. Bert Boon

19.12.2021 12:32

Post iom da serĉado en nia arkivo mi trovis ke NEL asignis la ordenon Pro Merito al Madeleine Haudebine 4. julio 1953, Narvik: Mi trovis malneton de tiurilata letero al ŝi: "Pro via energio, daŭra kaj efika laboro instruante Esperanton dum 4 jaroj en Norvegujo".
Do mi serĉos pliajn informojn en la aktualaj numeroj de N.E.isto 1953. Eble postmorgaŭ.
Kunlaboreme
Douglas Draper
en la E-oficejo

19.12.2021 19:02

Biblioteko Montagu C. Butler estas asocia membro de ENA (Esperanto-Numismatika Asocio). Ni sendis al la kutima retadreso bondezirojn pro novjaro, sed la mesaĝo returnis. Ĉu vi havas novan retadreson? Ĉu vi regule (kvarfoje jare) ricevas la revuon "Esperanta Numismatiko"?
Samideane,
Mag. Fil. Bert Boon
Iniciatinto de ENA
Finredaktoro de EN
Fakdelegito de UEA


21.12.2021 14:42

Saluton, mi bedaŭrinde ne trovis mencion en Norvega Esperantisto 1953 de la asigno de la medalo, sed jen foto de ĝi.

Kunlaboreme

Douglas Draper

en la E-oficejo en Oslo



☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

19.12.2021 17:44

Estimata samidean(in)o,

En la aldonita bildo estas la siglo I L E F. Kion tio signifas? Ĉu vi havas informojn pri tiu 1988a filmfestivalo en Vraca?

Multan antaŭdankon!

Altestime,

Mag. Fil. Bert Boon

23.12.2021 2:02

Saluton, estimata,

oni plusendis al mi vian helpopeton.

Bedaŭrinde, mi mem nenion scias pri tiu ĉi aranĝo. Mi provos esplori, sed mi bezonos iom da tempo.

Antaŭ kelka tempo iu jam demandis pri tiu ĉi festivalo, kaj mi ne povis trovi informojn, kvankam mi telefonis al pluraj personoj. Nun mi ekhavis la ideon telefoni al veterano-filatelisto. Eble li ion scias - almenaŭ pro la filatelajoj.

En nia asocia organo verŝajne aperis artikolo pri la festivalo. Bedaŭrinde, mi ne havas arkivon de la revuo el tiu tempo, kaj la oficejo de BEA, kie preskaŭ certe estas, momente ne funkcias pro la pandemio. Do eble printempe mi povos kontroli tie, se dume mi nenion trovos.

Amike,

Mariana Evlogieva

23.12.2021 9:23

Saluton Mariana!

Multan dankon pro viaj (estontaj) penoj por helpi la fakgrupon ENA. Ni evidente estos tre paciencaj.

Samtempe mi deziras, en la nomo de ENA kaj en propra nomo, al vi kaj viaj geamatoj ĉion bonan por 2022!

Amike kaj numismate,

Bert

Iniciatinto de Esperanto-Numismatika Asocio

23.12.2021 10:16

Saluton, estimata,

mi ĵus parolis kun Petar Todorov, E-veterano kaj longtempa estrarano de BEA.

Ankaŭ li mem nenion scias pri la evento. Supozeble ĝin organizis la tiam ĵus emeritiĝinta ĉefredaktoro de "Bulgara Esperantisto" Donĉo Hitrov, do preskaŭ certe li verkis pri ĝi por nia revuo.

ILEF laŭ Petar Todorov signifas: Internacia Ligo de Esperantistaj Filmistoj. Hitrov mem estis ne nur ĵurnalisto, sed ankaŭ filmisto kaj fotisto. Verŝajne temas pri faka aranĝo, kiu ne celis vastan publikon, kaj tial neniu el la demanditaj scias pri ĝi.

La alian veteranon, kiun mi menciis - s-ron Georgi Litov - mi ne sukcesas atingi. Mi supozas, ke li jam malbone aŭdas kaj tial ne respondas al telefonalkvokoj. Li uzas Fejsbukon kaj hieraŭ sendis al mi festajn bondezirojn, sed ŝajnas al mi, ke li ne scias kiel legi ricevitaĵajn mesaĝojn kaj neniam respondas al ili. Do mi plu provos telefone. Sed se temis pri faka aranĝo, tre verŝajne ankaŭ li nenion scias, do necesos serĉi en la revuo, kiam mi havos aliron al malnovaj numeroj.

Amike,
Mariana Evlogieva



26.12.2021 18:32

*Estimata Sinjoro Perera, kara kolego-delegito,
Vian retadreson mi trovis en la Jarlibro (bedaŭrinde ne estas delegito en Ginova), do mi petas al vi helpi min solvi problemon de manko de informoj. Mi esperas, ke mia peto ne tro ĝenos vin je la fino de la jaro.*

Mi hazarde trovis foton de stampilo kun surteksto "Genova Espero", eble la nomo de (iama) ginova Esperanto-klubo (kvankam iam en tiu urbo ankaŭ ekzistis batalŝipo "Espero"!). Mi celas priskribi ĝin plejeble komplete en la venonta numero de la ENA-revuo, kun - se eble - ĝia historieto.

Mi jam antaŭdankas vin pro via helpo kaj kunsendas bondezirojn al vi kaj al via familio pro la jarŝanĝo..

*Altestime kaj numismate,
Mag. Fil. Bert Boon (Belgio)*

Iniciatinto de la Esperanto-Numismatika Asocio (ENA, ekde 2014)

Ĉefredakoro de "Esperanta Numismatiko"

Fakdelegito de UEA



26.12.2021 23:49

Estimata Sinjoro Boon, kara kolego,

Jes, mi povas helpi vin, kvankam ne perfekte.

La nomo en la stampilo devas esti GERONA ESPERO. Bonvolu kontroli ĉar en mia komputilo la fotografiaĵo ne estas klare difinita.

GERONA [prononcu ĥerona] estas la hispana formo por la kataluna urbo GIRONA [prononcu ĵirona, kvankam esperantigita Ĝirona].

Momente mi povas nur informi pri la tempo post la hispana civila milito [1936-1939]. Ĉu vi povas hipotezi pri la aĝo de la stampilo?

Mi informas vin akorde a la dokumentoj kiujn mi havas hejme. Eblus serĉi pli, sed tio postulus plian tempon.

Esperanto estis malpermesita en Hispanio post la civila milito [La Danĝera Lingvo, p. 137-a al 140-a]. Iom post iom oni permesis pli, sed nur por Hispana Esperanto-Federacio, ne por Kataluna Esperantista Federacio.

La nova kataluna asocio [Kataluna Esperanto-Asocio] estis permesita nur en 1982 [la diktatoro Franco mortis en 1975]. Ĝirona Espero estis parto de Kataluna Esperanto-Asocio]. Mi preparis pliajn datumojn pri tiu Ĝirona Espero, sed nun mi ekkonscias pri la secesi-stilo [Jugendstil] de la ornamaĵoj de la stampilo. Do, eble temis pri antaŭa esperanto grupo en tiu sama urbo, Girona.

Pri via aserto "(kvankam iam en tiu urbo ankaŭ ekzistis batalŝipo "Espero!")" mi surpriziĝas. Girona situas for de la maro.

Ekzistis militŝipo Gerona en la hispana mararmeo [https://es.wikipedia.org/wiki/Gerona_\(1864\)](https://es.wikipedia.org/wiki/Gerona_(1864))

Multaj dokumentoj perdiĝis pro la Franco-isma subpremado. Scii pli pri tiu stampilo povus helpi rekuperi parton de tia perdo.

Elkoraĵo saluton,

Ramon Perera

27.12.2021 10:48

Saluton denove,

Mi trovis ion interesa. Atesto pri la ekzisto de societo Gerona Espero en doktora tezo [en la kataluna lingvo] pri asociemo kaj politika vivo en Girona.

Jen la ligilo al la tezo,

<https://www.google.com/url?sa=t&rct=j&q=&esrc=s&source=web&cd=&cad=rja&uact=8&ved=2ahUKEwiR5LKk0IP1AhVEyhoKHdRnDZ8QFnoECBAQAQ&url=https%3A%2F%2Fwww.tesisenred.net%2Fbitstream%2Fhandle%2F10803%2F286288%2Fmapg1de1.pdf%3Fsequence%3D1%26isAllowed%3Dy&usg=AOvVaw3e4hWURA6UaVSHhH9p-06l>

La referenco aperas en la paĝo 216-a. Mi aldonas kaptajon de la ekrano.

Elkoraĵo saluton,

Ramon Perera

27.12.2021 10:58

Ankoraŭ pli,

Informo pri Gerona Espero [kaptajo de ekrano] en la ĵurnalo El Norte, 30-januario-1921.

Jen la ligilo,

https://prensahistorica.mcu.es/ca/catalogo_imagenes/grupo.do?path=1003546817

Ramon

27.12.2021 11:02

Alia. La ligilo,

https://aladi-dvol.diba.cat:444/record=b1177755~S171*cat

Ankaŭ kaptajo de ekrano.

27.12.2021 11:09

Ligilo,

https://www.google.com/url?sa=t&rct=j&q=&esrc=s&source=web&cd=&cad=rja&uact=8&ved=2ahUKEwjS5ZT624P1AhVhgv0HHSvBAH44ChAWegQIBxAB&url=http%3A%2F%2Fwww.raco.cat%2Findex.php%2FAnnalsGironins%2Farticle%2FviewFile%2F53844%2F64054&usg=AOvVaw06_Ld2Kdk_z2pCd8_w2I63

27.12.2021 11:26

Multan, multan dankon, Ramon. La indiko 1913 klarigas sendube la uzon de ornamaĵoj en la stilo de la Jugendstil. Do, nia stampilo datas certe el tiu epoko. Aliflanke la mencio 1930 montras ke ĝi ankoraŭ ekzistis antaŭ la komenco de la diktaturo. Tre interese!

(Pri tiu militŝipo mi tute eraris, ĝi estis italdevena el Genovo, ne el Geronio).

Danke kaj amike,

Bert

PS Kiam aperos la artikolo (probable je la fino de aprilo) mi sendos la revuon al vi.

27.12.2021 11:16

Paĝo 60-a

Ligilo,

https://cdn.girona.cat/sgdap/sgdapdocs/Alcaldes/Josep_Maria_Dalmau_Casademont.pdf

27.12.2021 11:27

Jen la krono sur la venonta artikolo!

Bert

27.12.2021 11:34

<https://www.girona.cat/sgdap/101fotos/eng/fitxa.php?reg=101460>

https://ia.wikipedia.org/wiki/File:Esperantistoj_Girona_1921.jpg

Kaj lasta informero + kaptajo.

[https://bibliotekoj.org/ke1/KE038\(1913-05\).pdf](https://bibliotekoj.org/ke1/KE038(1913-05).pdf)

Amike,

Ramon



03.01.2022 11:56

Saluton Magdalena!

Kiel vi fartas? Ni esperas ke vi kaj viaj geamatoj estas en bona sano. Krome mi deziras al vi ĉion bonan por la nova jaro.

Mi bezonas vian helpon por priskribi medalon kun teksto en via lingvo, mi pensas. Ĉu vi povus traduki la tekston tute sube kaj tajpi la nomon de la probabla medalisto en la dekstra, supra angulo. Kroma demando: ĉu vi eble havas informojn pri tiu medalisto?

Tutkore mi jam antaŭdankas vin.

Amike kaj numismate,

Bert



03.01.2022 18:21

Saluton, kara Bert!

Jen kion mi eksciis pri via plakedo:

Plakedo okaze de la **40a datreveno** (1872-1912) de la **fondo de la Societo Komenský en Vieno**. *Promenanta Komenio ĉirkaŭita de nudaj infanoj*. **Signita** ČEJKA FEC. **Bronzo**. **Mezuroj**: 57 x 75mm. **Pezo**: 131,7.2g. **Jaro**: 1912. **Aŭtoro**: Jan Čejka (1878 (30a junio 1888 Jičín – 1a julio 1934 Jičín) ĉeĥa akademie pentristo

(https://cs.wikipedia.org/wiki/Jan_%C4%8Cejka).

La Societo Komenský estis fondita en Vieno en la jaro 1872. En sia jubilea 40a jaro de sia agado ĝi havis jam 51 sekciojn, el kiuj 25 funkciis en Aŭstrio kaj 26 en la ĉeĥaj regionoj kun ĉirkaŭ 13 000 membroj. En la lernejoj de Komenský en la jaro 1912 instruis 63 instruistoj kaj

aliaj dungitoj. En ĉi tiu jubilea jaro la Societo proprakoste vivtenis entute kvin bazlernejojn (III., X., XII., XX. viena distrikto kaj Poštorná, el kiuj tamen lernejoj en III, XII. kaj XX. distrikto estis fermitaj), tri kuranorejojn en III. kaj X. distrikto, en Poštorná kaj tri lingvolernejoj, kie estis instruata la ĉeĥa lingvo. Krom lernejoj aferoj la Societo okupiĝis pri prelega kaj biblioteka aktivadoj kaj ankaŭ organizis por ĉeĥaj infanoj el Vieno feriajn restadojn en la ĉeĥaj landoj ktp.

VACULÍK, Jaroslav - České menšiny v Evropě a ve světě, Praha 2009, s. 131–134 (Ĉeĥaj minoritatoj en Eŭropo kaj en la mondo. Prago 2009, p. 131–134)

Amike, korsalutante Fejfi



05.01.2022 23:16

*Estimata sinjoro Linnamägi, kara Madis,
Se vi vere estas la iniciatinto de du esperantaj medaloj koncerne kantoturnirojn en via lando bazitaj sur Kannelmuziko mi petas helpon de vi.
ENA preparas la kompiladon de la “UNUA ESPERANTO- NUMISMATIKA KATALOGO” kaj intencas, se eble aldoni tiujn du medalojn. Tial ni bezonas bildojn kaj teknikajn kaj prieventajn informojn pri ambaŭ medaloj. Ĉu vi povas kaj volas helpi nin?
Krome, kiel numismato, mi dezirus aĉeti ilin por pliriĉigi mian kolekton.
Mi antaŭdankas vin kaj vin salutas
Samideane kaj numismate,
Mag.Fil. Bert Boon
Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)
Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"
Fakdelegito pri numismatiko*

06.01.2022 16:54

Kara Bert!
Mi elkore pardonpetas, ke ne sukcesis pro diversaj kaŭzoj finfari la permeson al Vi!
Nun mi nepre faros:
- kio eblos per mia hejma fondaĵo en Tartu, ankaŭ pere de tiamaj laŭreatoj;
- krome: la Tartua Esperanto-Klubo finis sian agadon kaj transdonis en 2012 sian paperan arkivon kaj aĵojn al la Estona Literatura Muzeo, mi iros al la Muzeo kaj donos katalogaĵojn kaj alian informon al Vi.
Samideane
Madis Linnamägi



09.01.2022 20:55

*Saluton kara samideano!
Multan dankon pro via membriĝo. Mi ĝojas bonvenigi vin kiel 151an individuan membron de ENA.
Amike kaj numismate,
Mag. Fil. Bert Boon*

09.01.2022 22:27

Kara

Mi estas historiisto kaj interesiĝas pri Bitarkivo.org, kie estas arkivataj revuoj de la movado. Legante ilin, mi vidis la revuojn de ENA kaj legis ilin. Tre ĝojgis min la alta kvalito de via publikaĵo. Mi interesiĝas pri numismatiko ne kiel kolektisto, sed kiel historiistoj, kvankam mi hazarde havas kelkajn malmultajn esperantajn numismatikaĵojn.

Roberto da Silva Ribeiro.

11.01.2022 11:52

Saluton kara Roberto!

Mi volas danki vin pro viaj pozitivaj rimarkoj pri la nivelo de nia revuo!

*Mi certe ne intencas iel puŝi vin, sed mi volas informi vin, ke ENA konsideras la membrojn kiel **eblajn, potencialajn** kunredaktorojn, koncerne la verkadon de iu ajn artikolo por unu el la revuaj rubrikoj. Ekzemple "Historiaj aspektoj de numismatiko" ktp.*

Ĉu vi eble, en via eta kolekto, posedus numismatikaĵon kiun mi ne konas, ekzemple el via lando mem? Kiel finredaktoro mi kompreneble daŭre esploras por povi priskribi al mi ne-konatajn esperantajn monerojn kaj medalojn. Ni celas baldaŭ kompili la unuan numismatikan katalogon...

Amike kaj numismate,

Bert

11.01.2022 12:08

Certe mi tre ĝojos verki ion por la revuo, kvankam mi ne estas fakulo. Mi treege interesiĝas pri la "misteroj", kiujn vi aperigas, kaj mi certe serĉu pri unu el ili kaj, kiam eble mi verkos artikolon.

11.01.2022 17:10

Multan antaŭdankon al vi!

Numismate,

Bert

13.01.2022 17:19

Kara sr-o Boon

Mi pruvis sendi al vi skizon de artikoleto. Mi ne scias se vi ricevis ĝin. Mi pruvis verki ion laŭ la modelo de la revuo. Vi tute rajtas reverki ĝin, se bezone.

Roberto da Silva Ribeiro

12.01.2022 13:52

Mi ne estas fakulo pri numismatiko, kiel mi diris, sed mi pruvis verki artikoleon pri medalo omaĝe al brazila esperantisto. Mi pruvis sekvi la modelon de aliaj artikoletoj sur la revuo. Eble estas kelkaj lingvaj eraroj.

Vi povas libere modifi ĝin, se vi interesiĝas pri ĝi.

Roberto



13.01.2022 17:19

Kara Roberto!

Pro komputila problemo mi dum kelkaj tagoj ne povis malfermi la aparaton. Mi pardonpetas! Via artikoleto estas agrabla surprizo kun altkvalitaj fotoj kaj tre interesaj informoj. Mi baldaŭ ekprilaboros ĝin kaj publikigos ĝin en la numero de aprilo, ĉar la numero de januaro (kiun vi post nelonge ricevos) jam estas kompleta. Do koran dankon al vi!

*Mi havas tamen alian ne-urĝan kroman peton, se vi permesas. Aldone mi sendas skanon pri du brazilaj medaloj. Mankas al mi jam delonge **fotoj** kaj ĝeneralaj informoj. Ekzemple, kio signifas "I Bieflor"?, ktp.*

*Tre probable tiuj medaloj ne plu estas aĉeteblaj por mia kolekto, sed tio ne gravas...
Mi antaŭdankas vin
kore kaj numismate,
Bert*



13.01.2022 18:07

La unua medalo estis farita de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, antaŭe "rivala" nacia E-asocio, nuntempe loka asocio de Rio de Janeiro. Ĝia e-adreso estas esperanto.kke@gmail.com. Mi jam petis kromajn informojn al ili. I BIEFlor signifas simple I-a [unua] Brazila Internacia Ekspozicioj de FLORoj. La dua estis eldonita de Associação Paulista de Esperanto contato@easp.org.br mi ankaŭ jam petis informojn al ili.

13.01.2022 18:21

*Nekredeble rapide! Vi vere estas valora kunlaboranto por ENA!
Multan dankon, Roberto. Mi estas tre scivola!
Amike,
Bert*

14.01.2022 15:15

La Associação Paulista de Esperanto, kiu eldonus la murmedalo pri Bona Espero, informis al mi ke ili ne havas registrojn aŭ alian informon pri ĝi. Ili informis ke la nura murmedalo, kiujn ili eldonis estas tiu



Ili ne havas multajn informojn pri ĝi. Ili eĉ ne havas unu ekzempleron el ili. Ili nur scias informi ke tiu murmedalo estis el vitrofibro. Ili havas nur tiun fotografion en siaj arkivoj.

14.01.2022 16:02

*Kara Roberto,
Multan dankon. Vi denove malkovris por ENA nekonatan, belan murmedalon en rara substanco, kiun mi povos "enkonduki" en nian revuon. Mi ĝojas!
Bert (Alberto)*

14.01.2022 18:58

Ne estis multe da laboro. Mi trovis ke ekzemplero de la fama medalo "Frique Atlantique" estis vendita en Rio de Janeiro 2015. Ĝi ne havas mencion al Sens. Laŭ anonco de aŭkciisto, ĝi estas 32g kaj 42mm. Jen la anonco <https://www.personaliteileiloes.com.br/peca.asp?ID=3238290>. Alia anonco estas pri medalo de Roma UK 1935, ankaŭ vendita en aŭkcio 2015 en Rio de Janeiro. Jen la anonco <https://www.conradoleiloeiro.com.br/peca.asp?ID=775864>

15.01.2022 11:20

*Kara Roberto,
Mi ĵus finverkis la artikolon pri Almeida. Mi do petas vin provlegi ĝin kaj sendi al mi viajn eventualajn rimarkojn aŭ ideojn.
Ĉar la wordversio estis fuŝa post provsendo, mi devas sendi ĝin en PDF-versio. Do vi ne povas ŝanĝi ĝin direkte en la teksto.
Mi jam antaŭdankas vin pro via nemalhavebla kunlaboro.
Amike kaj numismate, Bert*

15.01.2022 14:05

Ĉar vi uzis la vorton "nomadoj" en la priskribo de la romano, uzu ĝi anstataŭ "emigrantoj" [vere tajperaro pro "migrantoj"] en priskribo de medalo, aŭ male.
Roberto.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

15.01.2022 12:35

kara bert, mi ne scias kiel danki vin pro la daŭra sendado de via interesa bulteno.
amike
renato

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

15.01.2022 12:43

Kara Bert
Dankon pro la nova bela revuo!
Mi jam metis ĝin en la kolekto de Vikiflandrio.
[Esperanto arĥivo Esperanto Numismatika Asocio \(alcl.be\)](http://Esperanto arĥivo Esperanto Numismatika Asocio (alcl.be))
Kun afablaj salutoj,
Albert

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

15.01.2022 14:19

Kara Bert, feliĉan novan jaron al vi.
Dankon kaj gratulojn pro la nova numero, kiel ĉiam riĉa je surprizaj informoj!
Kuraĝon por entrepreni la katalogon! Ne perdiĝu la ĝisnuna sciaro.
Pri la poŝta stampilo sur paĝo 15, ĉu ĝi troviĝas ĉe esperantistoj?! En Brazilon ĉiu poŝta
memorstampilo iras al la Poŝta Muzeo en Braziljo por enarkiviĝo.
Amike
James

15.01.2022 17:19

*Kara James!
Tutkore reciprokajn bondezirojn al vi kaj al via kara familio!
Dankon pro via aprezo de la ENA-revuo.
Koncerne la stampolamenon de ILEF. Ne estas oficiala poŝtstampo, sed esperantista, bulgara
asocio-stampo okaze de filmevento. Mi aĉetis ĝin en aŭkcio de bulgara komercisto. Pro
similaj fabrikado-teknikoj kaj sama aspekto, mi konsideras tiujn stampolamenojn kiel
numismatikaĵoj. Ĉu vi konsentas pri tio?
Permesu, ke mi rememorigas vin ĉiokaze pri mia peto pri unu brazila medalo kaj pri brazila
murmedalo...Dankon!
Amike kaj numismate,
Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

16.01.2022 08:08

Koran dankon, kara Bert, pro la plej nova numero de via revuo!
Kvankam nefakulo, mi trovis por mi vere interesajn tekstojn; precipe interesa por mi estas la
artikolo pri moneroj kiel ornamaĵoj. Nome, en kelkaj regionoj de Kroatio ili estas neevitindaj
elementoj de virinaj popolkostumoj, ekzemple en la orienta parto kiu nomiĝas Slavonija. Tie
ili nomiĝas "dukati" = "dukatoj".

Jen unu foto:

https://m.sbplus.hr/opcine/sibinj/zivot/ostalo/mis_fotogenicnosti_na_izboru_najslavonke.aspx#.YePDsf7MJPY

Amike el Kroatio!

Velimir

16.01.2022 10:48

Kara Velimir!

Mi ĝojas pro via reago, kiu montras, ke moneraj kaj monecaj dekoraĵoj vere estas internaciaj kaj kutimaj en diversaj kulturoj. Sur tiu belega foto temas pri t.n. "monecaj" ornamaĵoj, do objektoj kiuj estas bazataj sur veraj moneroj. Tre interese! Mi kore dankas vin pro via valora aldono!

Amike kaj numismate,

Bert



16.01.2022 18:06

Saluton Bert B

Ĉu ENA foje kunvenas por membrokunveno aŭ por moner-faka renkontiĝo?

Eble membrokunveno okazas en UK.

La Esp-kastelo Greziljono ŝatus vidi grupon de numismatoj kadre de iu renkonto

Bert Schumann

16.01.2022 19:07

Kion vi proponas sen iu dubo estas tre bona ideo. Mi mem jam pripensis tian eventon por perrete festi en 2024 la 10-jaran jubileum de nia revuo. Konkreta programo ankoraŭ ne ekzistas, ĉar mi devus prepari tian renkonton kaj unuavice informi kaj konsulti la aktualajn entute 173 membrojn/abonantojn, ĉu ne? Ĉar mi mem nur malofte rete kunvenas, ĉar miaj spertoj, i.a. kun zoom estas (teknike, kvalite) malbonaj. Mi do bezonus iun kiel ekrana gvidanto, por kiu tio estas ĉiutaga laboro...

Krome ne estus maleble, ke pere de volontulo(j) ni povus antaŭ la jubileo jam kelkfoje "ekzerci", ekzemple okaze de zamenhoffesto aŭ UK. Kial ne?

Multan dankon al vi, kara samideano kaj samnomulo!

Amike kaj numismate,

Bert



16.01.2022 23:35

Kara samideano Bert,

Gratulojn pro la nova numismatika revuo.

Ĝi estas tre interesa kaj leginda.

Memoru ke mi konsilis al vi iam bonkvalite presigi fotokopie la tutan serion por interesatoj kaj Esperanto-bibliotekoj en la mondo, inter ili la Antverpena Erfgoedbibliotheek "Hendrik Consience" kiu havas oficialan Esperanto-sekcion.

Tiel via unika laboro ne perdiĝos kaj estos nova perlo inter la Esperantlingvaj publikaĵoj.

Kuraĝigajn salutojn.

Amike.

Jo Haazen

17.01.2022 09:50

Kara Jo,
Multan dankon pro via afabla aprezo de la ENA-revuo.
Mi ne forgesis vian konsilon, male. La revuo estas konservata i.a. en "Hendrik Conscience",
en "Vikiflandrio" en la Esperanto-muzeo en Vieno en la numismatika fakultato de la viena
Universitato en Bitoteko en Hispanio, ktp, ktp.
Certe vera kuraĝigo estas via reago, pro kio mi tutkore dankas vin!
Amike kaj numismate,
Bert

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

17.01.2022 10:18

Kara samidean(in)o!

Estante numismato, mi scias, ke eldoni esperantajn memormedalojn estas **multvalora iniciativo** okaze de naciaj kongresoj kaj aliaj eventoj en Hispanio.

Do ENA petas vian asocion helpi por kompili la "Unua Numismatika Katalogo de Esperanto"-n per sendo de fotoj kaj informoj pri esperantaj medaloj laŭ la ekzemploj en la aldonita revuo, rubriko Moneroj & Medaloj.

Koran antaŭdankon kaj numismatajn salutojn!
Mag.Fil. Bert Boon
Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)
Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"
Fakdelegito pri numismatiko

17.01.2022 20:28

Saluton, Bert,
Mi resendis vian mesaĝon al la estraro de HEF por inkludi ĝin en la Tagordo de la venonta Kunveno okazonta venontlunde, 24 de januaro.
Kore,
Ángel
Prezidanto de HEF

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

17.01.2022 17:14

Karaj Gesamideanoj!
Mi almetas la emblemon de la 22-a Internacia Medicinista Esperanto-Kongreso.
Kore:
D-ro Imre Ferenczy



17.01.2022 5:19 PM

Dankon, D-ro Ferenczy! Ĉu estos ankaŭ medalo aŭ insigno?
Estime kaj numismate,
Bert Boon
Por ENA

17.01.2022 17:46

Kara Bert Boon,
Koran dankon pro via interesiĝo pri insigno. Mi demandos LKK-on kaj poste informos vin.
Kore:
Imre Ferenczy

10.02.2022 09:40

Estimata D-ro Christoph Klawe, Prezidanto de UMEA!
En la nomo de ENA kaj en mia propra nomo mi tutkore gratulas vin pro via altmerita elekto. Mi deziras al vi elpensi bonajn iniciativojn, taŭgajn kaj sukcesplenajn projektojn kaj lasta sed ne balaste la pripenson por -okaze de venontaj gravaj UMEA-eventoj- la eldono de belaj memorigaj medaloj, laŭ bona kutimo kaj tradicio en la rondo de UMEA.
Altestime kaj numismate,
Mag. Fil Bert Boon
Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)
Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

15.02.2022 11:30

Kara s-ano Boon,
tre koran dankon pro viaj gratuloj! Eldono de bela kaj altkvalita memormedalo kompreneble estas simpla demando de la kostoj. Se vi havas kontakton al malavara sponsoro, kiu pretas pagi la tuton, nepre sciigu nin!
Amike,
Christoph Klawe

15.02.2022 16:45

Tre kara s-ano Klawe,
Bedaŭrinde mi ne konas sponsoron kaj mia apogpago de pensiulo al mi tre bedaŭrinde ne permesas sponsori tian projekton. Tamen, laŭ kutimo mi mendas kvar ekzemplerojn de ĉiu nova kaj havebla esperanta medalo, kiel subtenanto de tiaj projektoj. Krome, kiel iniciatinto de ENA, mi konsideras, ke parto de mia tasko estas instigi esperantistojn kaj esperantajn asociojn eldoni memormedalojn por ilustraj kaj "garni" la historion de nia internacia kulturo. Ili estas la plej longdaŭraj kaj estetikaj montraĵoj de nia vasta agado.
Mi do tutkore dankas vin pro viaj reago kaj prava kontraŭargumento. Tamen mi "obstine" persistos! Mi ja estas kaprica oldulo!
Amike kaj numismate,
Bert Boon

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

26.01.2022 06:45

Kara Sinjorino!
Mi kore reciprokas viajn bondezirojn por la jaro 2022!
Samtempe mi havas helpopeton. Por kompletigi eldonotan numismatikan katalogon internacian, mi bezonas fotojn kaj informojn pri du brazilaj medaloj:
1: medalo de Kultura Koop. de Esperantistoj pri la Ia Bieflor en Rio kun steleto E kaj ruĝa rozo kaj surskribo FLOR-LUDOJ JOGOS FLORAIS.
2. murmedalo sur ligna disko de BONA ESPERO kun surskribo: FAZENDA ESCOLA BONA ESPERO
Mi jam antaŭdankas vin por informoj aŭ adresoj de personoj kiuj povas havi informojn.
Kore,
Bert
Por ENA

09.02.2022 19:50

Estimata Samideano Bert Boon

Koran Saluton!

Mi pardonpetas pro la malfrua respondo ĉar laste mi multe hastas pro multe da laboro. Jen la informoj petitaj de Vi:

1- medalo de Kultura Koop. de Esperantistoj pri la Ia Bieflor en Rio kun steleto E kaj ruĝa rozo kaj surskribo FLOR-LUDOJ JOGOS FLORAIS.

2- Kultura Kooperativo de Esperantistoj

Respondeculo:s-ro Givanildo Costa [prononco: Jivaniŭdo Kosta]

2. murmedalo sur ligna disko de BONA ESPERO kun surskribo: FAZENDA ESCOLA BONA ESPERO

Fazenda Escola "Bona Espero"

Respondeculo:s-ino Adarci Sousa [Prononco: Adarsi Souza]

Plej amike, frate,
Maria Aparecida

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

29.01.2022 14:06

Kara Bert,

Ricevante vian revuon mi ĉiam surpriziĝas pro la profundaj, profesiaj enhavo kaj kvalito de ĝi!

Multaj ne esperantaj eldonaĵoj postkuras vian eldonon.

Dankegon amikan!

Plej amike,

Euheno.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

03.02.2022 12:18

Mi eksciis pri kvar aliaj medaloj omaĝante esperantistojn. Estas alia medalo pri José Américo de Almeida kaj aliaj tri medaloj pri aliaj esperantistoj

Carlos Xavier Paes Barreto eldonita de UFES [Federacia Universitato de Espírito Santo]

Medalha Demócrito Rocha eldonita de Sindicato dos Odontologistas do estado do Ceará [Sindikato de Dentistoj de Subŝtato Cearao].

Deoclécio Lima Verde ; eldonita de Masonisma Loĝo Dr. Lima Verde.

Mi ne havas kromajn informojn.

Roberto Ribeiro

03.02.2022 19:56

Saluton kara Roberto!

Dankon pro tiuj tre interesaj informoj. Baldaŭ mi komencos esplori en la Interreto por trovi eventualajn fotojn de medaloj omaĝantaj tiujn samideanojn!

Via kunlaboro estas ege valora!

Amike kaj numismate,

Berto

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

13.02.2022 17:36

*Estimata Sinjorino Adarci Sousa, kara samideanino,
Vian retadreson mi ricevis de mia amikino Maria Aparecida de Portalo Bona Volo.
Mi bezonas vian helpon koncerne medalon kun surskribo "FAZENDA ESCOLA BONA
ESPERO". Meze oni vidas tri foliojn kaj malferman libron. Por kompletigi KATALOGON,
kiu baldaŭ estos eldonita, mi bezonas FOTON de tiu medalo.
Esperante, ke vi povos helpi min, mi tutkore antaŭdankas vin!
Amike kaj numismate,
Mag. Fil. Bert Boon
Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)
Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"*

15.02.2022 2:29

Estimata samideano BERT BOON,

kun plezuro ni legis vian mesaĝon senditan al nia eksinstruistino, kiu intertempe edziniĝis kaj forlasis la institucion Fazenda Escola Bona Espero.

Sed tre volonte ni fotis nian simbolon kaj sendas al vi ĉi kune la foton por via uzo laŭplaĉe.

La desegno estis inventita en 1982 de mia frato Otto Sandkühler, esperantisto, kiu volontulis en Bona Espero, sed jam forpasis delonge.

Elkorajn salutojn kun nia admiro pri via numismatika agado en la esperanto movado,

Ursula Grattapaglia

15.02.2022 11:27

*Estimata samideanino URSULA GRATTAPAGLIA,
Multan dankon pro via tuja reago, sed, probable hazarde, vi NE kunsendis la foton de la
medalo kies simbolon desegnis via karmemora frato. Mi paciencie atendas vian aldonon kaj
jam tutkore denove dankas vin.
Rekompenca kaj danke mi aldonas la novan numeron de la ENA-revuo, kiun vi povas ricevi
rete tute senkoste! Ĉu tiu medalo ankoraŭ estas aĉetebla?
Amike kaj numismate,
Berto*

15.02.2022 17:00

Estimata, mi sincere bedaŭras mian mankon, ne aldoni la foton! Pardonu, jam estis nokte malfrue mia sendo al vi kaj tiel okazis.

Sed jen vi ĝin havas nun. Ne estas vendebla, Kaj ni ĝin donacis al helpantoj de nia agado por infanoj dum 40 jaroj.

Je via dispono,
amike Ursula Grattapaglia

16.02.2022 10:18

Estimata Sinjorino,

Tute ne gravis. Tio al mi diversfoje okazis!

*Mi ege dankas vin pro la belega kaj bonkvalita foto de la murmedalo, kiu kune kun la priskribo aperos en la aprila numero de nia revuo, **kiun mi evidente sendos al vi.***

Tamen mi bezonas, se eble ankoraŭ kelkajn informojn. Jen miaj demandoj:

- Ĉu via frato estis artisto/ medalisto? Ĉu jes, mi povus aldoni lian biografion kiel artisto al la rubriko 'Medalistoj'.

- en kiu jaro la medalo estis eldonita?

-Kiom da ekzempleroj estis faritaj?

-Kiaj estas la diametroj de la ligna kaj de la bronza diskoj?

-Ĉu ĝi estis farita en Brazilo mem?

Mi pardonpetas pro la rabo de via libertempo per tiuj kromaj demandoj, sed por la preparata katalogo gravas priskribi la artefaktojn plejble komplete kaj precize.

Aldone mi danke kaj rekompense sendas al vi numeron de via revuo kun por vi probable interesa objekto. Denove koran antaŭdankon!

Amike kaj numismate,

Bert

16.02.2022 17:18

Kara samideano, kun granda intereso kaj surprizo mi rapide tralegis vian altvaloran revuon pri numismatikaj informoj! Por la historio de la movado ĝi estas altvalora.

Nun ree al nia modesta simbolo de la Bienlernejo Bona Espero.

Vi certe komprenis ke la tri folioj signifas ke la lernejo troviĝas en grandega bieno de 1440 hektaroj kie ni protektas la originan savanon kaj plantas ĉiujn manĝaĝojn kiujn pli ol mil infanoj kaj instruistoj manĝis dum la jaroj.

En 26a julio la senprofitcela Bona Espero festos 65 jarojn da agado favore al infanoj el 8 urbetoj kaj vilaĝoj en malriĉaj agrarregionoj. La infanoj estis plejparte el analfabetaj familioj, do granda socia kaj kultura avanco. Ĉefe temis pri infanoj el *kilombo*, tio estas grupo de kaŝitaj afrikdevenaj sklavoj, kiuj vivis inter montoj de pli ol 200 jaroj tute izolitaj ĝis la okdekaj jaroj.

1. mia frato Otto Sandkühler, grafika desegnisto, havis propran entreprenon pri informado kaj propagando de malgrandaj komercistoj, en Germanio. Iasence li estis artisto pri informmodeloj.

2. La medalo estis produktita en la 80aj jaroj, sed korekte mi ne scias.

3. La ligna simbolo kun la bronza disko havas la diametron de 15 cm/12 cm.

4. La diskon produktis la pola esperantisto Grzembowski en la 80aj jaroj.

5. Interesa eble la kialo: G. kiu estris turisman agentejon, volis sendi grupon de esperantistoj al vizito de Brazilo kaj nia institucio. Ekzistis la financa problemo, kiun ni brile solvis, ricevante la 100 medalojn kaj tiel gastigante belan grupon da polaj esperantistoj dum la okdekaj jaroj.

Certe via eldono estos por ni granda honoro kaj en amika TV kanalo SUPREN, estrita de esperantistoj en Brasilia, nia ĉefurbo, ni faros specialan programon kun via revuo. Tiu kanalo havas esperantan nomon *TV SUPREN*, kun konstanta kurso de la lingvo kaj informprogramoj pri la utiligo de esperanto. Jen ilia simbolo. Membroj de Bona Espero aktive kunlaboras en tiu kanalo.



Mi esperas ke vi ricevis ĉiujn necesajn informojn. Sed se mankas iuj, volonte mi respondos. Ni deziras al via laboro grandan sukceson, ĉar grava tasko.

Amike Ursula G.

18.02.2022 11:01

Tre estimata Sinjorino!

Multan dankon pro la ampleksaj informoj per viaj respondoj al miaj demandoj. Tiel mi dume jam finverkis la ilustritan artikolon pri la murmedalo kaj Bona Espero, kiu aperos en la aprila numero de nia revuo kaj kiun mi evidente sendos al vi.

Profunde mi ankaŭ aprecias viajn pozitivajn eldirojn pri la nivelo kaj la historia valoro de nia revuo, kiu celas numismatike illustri la vastajn projektojn de nia movado ekde la komenco, el kiuj certe ankaŭ tiun kiun vi mem realigis kaj realigas per kaj por Bona Espero. Tiaj viaj vortoj instigas nian redakcion al daŭrigo de la (agrabla) esploro kaj verkada laboro. Dankon!

Entuziasmigas nin krome via intenco prezentigi nian fakgrupon kaj ties revuon en programo de TV- SUPREN. Jen grandaj honoro kaj rekompenco post preskaŭ dek jaroj! Espereble la elsendo ankaŭ persvados multajn brazilajn samideanojn kaj asociojn aliĝi tute senkoste, por ke la kvanto de ENA-anoj daŭre kresku, ankaŭ en via lando. Tion klarigas la lasta artikolo en ĉiu numero. (>Varbilo).

Por TV-SUPREN mi danke proponas alian interesan temon. Antaŭ kelkaj jaroj mi hazarde kaj ŝance aĉetis leterkarton de Zamenhof el 1902, pri kiu mi verkis dekpaĝan monografion por "Literatura Foiro". Tiun leteron Zamenhof sendis al sia amiko kaj perua pioniro Prof. D-ro Federico Villarreal en Lima, kiu ludis gravan rolon en la disvastigo de Esperanto en Sud-Ameriko. La retan tekston kun koloraj ilustraĵoj mi povus sendi al vi, se vi tion dezirus...

Ĝis baldaŭa reskribo!

Altestime kaj numismate,

Bert (Albert)



17.03.2022 14:44

Estimata Sinjoro Tornillo, kara samideano!

La fakgrupo pri esperanta numismatiko, ENA, preparas la eldonon de la UNUA KATALOGO de ESPERANTA NUMISMATIKO (UKEN) kaj petas la helpon de via fakgrupo.

Hazarde mi trovis fotojn de IFEF-medaleton el 1954. Por povi plejeble komplete priskribi ĝin, mi bezonas jenajn informojn: diametro, pezo, diko, eldonkvanto, metalo aŭ alojo, nomo de la medalisto.



Rimarko 1: se via grupo havus ankaŭ bildojn kaj informojn pri aliaj iam de IFEF eldonitaj medaloj, mi ilin povus aldoni al la katalogo.

Rimarko 2: se eble, mi ŝatus aĉeti IFEF-medalojn por mia privata kolekto.

Mi tutkore antaŭdankas vin,

Mag. Bert Boon, Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

17.03.2022 15:18

Karaj kolegoj,

mi ricevis la suban mesaĝon de Bert Boon pri katalogo de Esperanta Numismatiko.

Ĉu estas iu inter ni kiu povos helpi lin?

Por IFEF estus grave ke aperos niaj memoraĵoj en katalogo.

Antaŭ dankoj!

Vito Tornillo



24.03.2022 12:55

Saluton, S-ro Bert

Mi esperas ke vi bone fartas kaj ke ĉio enordas por vi.

Mi ĝojas ke ni denove iel renkontiĝas kaj povos kunlabori.

Kiel eble vi scias, mi komencis helpi al ESF Connected pri la kolektado de bonegaj kaj tre interesaj artikoloj diverstemaj, tial Angela informis min ke vi estas verkanta artikolon pri **Numismatiko - trezorujo de la (Esperanta) kulturo.**

Do, mi antaŭĝoje demandas vin, ĉu vi jam scias kiun tagon vi povos sendi la artikolon?

Certe, vi jam bone konas, sed ne superfluas la aŭtoraj gvidlinioj, kaze ke vi volas relegi ĝin, aŭ se vi havas demandon, bonvole diru al mi.

Dankon pro via kontribuemo al nia ESF Connected.

Dankeme kaj atendante vian respondon,

Luis Obando

24.03.2022 12:45

Saluton, S-ro Luis

Mi devas konfesi, ke la peto de Angela kaj mia tiutema konsento dume tute eskapis al mia atento, pro kio mi sincere pardonpetas.

Nuntempe mi ne estas hejme kaj ne havas materialon por verki tian artikolon surloke. Ekde venonta lundo mi hejme senhezite komencos verki ĝin. Mi nur demandas min ĉu la gvidlinio pri la amplekso de la artikolo inkludas (necesaĵn por tia artikolo) ilustraĵojn aŭ ĉu eblus verki artikolon felietone (ekz. en du aŭ tri daŭrigoj).

Mi salutas Angelan kaj vin.

Amike kaj numismate,

Bert

25.03.2022 6:46

Saluton, S-ro Bert

Mi tute komprenas.

Mi tute dankas vin pro tio ke vi pretas ekverki ĝin la venontan semajnon.

Pro la graveco de ĉi tiu temo, mi trovas ĝin tute inda por havi pli ol unu artikolon, do se vi preferas, (kaj tiel vi ne limigos vian vervon) vi povas dividi ĝin en du aŭ tri partojn/artikolojn, kaj tiel ni kreos etan serion pri la temo, tio estas tre bona strategio ĉar la legantaro legas etan kaj interesan artikolon kiu nepre vekas atenton pri la venonta parto, tiel vi facile povus aldoni ĉiujn ilustraĵojn kaj tiel ni riĉigos multe la artikolojn kaj la tutan blogon.

Mi elkore dankas vin pro via akcepto kaj kunlaboremo kun nia organizo, ni tre multe aprezas tion.

Do mi feliĉe atentos!

Amike,

Luis

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

A N O N C O J

&

E V E N T O J

Novaj bankbiletoj por EU

From: Henri Masson <espero.hm@wanadoo.fr>

Date: Fri, 21 Jan 2022 04:58:18 PST

La TV-kanalo France 2 anoncis en la ĉi-tageza ĵurnalo projekton de novaj bankbiletoj de la Centra Eŭropa Banko por EU-landoj.

La decido okazos en 2024.

Intertempe okazos konsultado de la civitanoj por elekti eminentul(in)ojn, kiuj plej bone spegulas Eŭropan Union.

Nu, mi tuj pensis pri d-ro Zamenhof, kiu jam en sia Alvoko al la diplomatoj, en 1915, pledis favore al kreo de "Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo".

Krome, tio okazas ĝuste kelkajn tagojn, post kiam mi publikigis franclingvan 9-paĝan dokumenton sub enigma titolo: "Juif et bienfaiteur de l'humanité" (Judo kaj bonfaranto de la homaro):

https://esperanto-vendee.fr/images/PDF/il_etait_juif.pdf

Estus bone klopori por ke, kiam okazos la konsultado, ni estu RAPIDEGE, FULMRAPIDE pretaj, por subteni la nomon de d-ro Zamenhof en ĉiuj EU-landoj.

Por virino mi volonte subtenos proponon por Bertha von Suttner:

Jen ligilo al la anglalingva anonco, de kie eblas ricevi tradukojn en ĉiuj EU-lingvoj):

<https://www.ecb.europa.eu/press/pr/date/2021/html/ecb.pr211206~a9e0ba2198.en.html>

Henri Masson

Attachments:

gofindkaogjphphf.jpg:

<https://groups.io/g/informa-reto-pri-Esperanto/attachment/1080/0//gofindkaogjphphf.jpg>

Juif bienfaiteur kovrilo - 2.jpeg:

<https://groups.io/g/informa-reto-pri-Esperanto/attachment/1080/1//Juif>

bienfaiteur kovrilo - 2.jpeg

Varbilo por ENA!

Karaj membroj!

Bonvolu fojfoje dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!

Bert

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko” en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol ok jaroj ĝis 152 individuaj membroj kaj 25 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”). Krome la *NUR PERRETA* revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, ni klarigos kiel vi povas (ne devas!) elŭti la jam aperintajn numerojn. SENPETE sekve vi ricevos ĉiujn novajn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

Vi krome rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”

bert.boon@skyne.be